



STATUTO
kaj
REGULARO
de la
Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj
I. L. E. I.

(fondita en la jaro 1949)

*Aprobata
de la Asemblea
delegitaro 1-4-1983
laŭ decido
de la 16a ILEI konferenco
en Seiano - Italio*

IDENTECO

Artikolo 1

La organizaĵo estas nomita: "Internacia Ligo de esperantistaj instruistoj".

En la plua teksto de ĉi tiu statuto kaj de la ĝenerala regularo nomita: "ILEI".

Artikolo 2

- 2.1 ILEI estas fondita en 1949 por nelimigita tempo.
- 2.2 ILEI estas faka organizaĵo pri edukado kaj instruado.
- 2.3 ILEI estas aliĝinta al UNESKO en Kategorio C, aŭgusto 1977, listo CPX/77/10 S.7 numero 110.
- 2.4 ILEI havas sian juran sidejon en la Respubliko San Marino.
- 2.5 ILEI estas demokrata organizaĵo, sendependa kaj memstara en rilatoj al aliaj organizaĵoj kaj institucioj.
- 2.6 La bazo de la laborpolitiko de ILEI estas la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj la Universala Deklaracio de la Rajtoj de la Infano.
- 2.7 La oficiala lingvo de ILEI estas la Internacia Lingvo-Esperanto.

CELO

Artikolo 3

Edukado al estimo de la Homo kaj Interkompreniĝo inter la popoloj.

TASKOJ POR ATINGI LA CELON

Artikolo 4

- 4.1 Unuigi instruistajn Esperanto-organizaĵojn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn.
- 4.2 Atenti, esplori kaj analizi la pedagogiajn problemojn en la instruado kaj edukado kaj labori por la solvo de tiuj problemoj.
- 4.3 Aranĝi kaj/aŭ subteni sciencajn esplorojn pri instruado de fremdaj lingvoj.
- 4.4 Organizati interŝanĝojn de spertoj el la pedagogiaj scienco kaj praktikado por plibonigo kaj modernigo de la Esperanto-instruado.
- 4.5 Organizati diversspecajn internaciajn araĝojn por infanoj cele al interkompreniĝo pere de la Internacia Lingvo.

- 4.6 Organizi pedagogiajn konferencojn kaj laborkunvenojn.
- 4.7 Aranĝi internaciajn ekzamenojn pri la instrukapablo en la Internacia Lingvo-Esperanto.
- 4.8 Kontakti kun registaraj, edukaj instancoj kaj aliaj institucioj kaj kunlabori kun Esperanto-organizaĵoj.
- 4.9 Eldoni publikaĵojn kaj komunikaĵojn.
- 4.10 Apliki aliajn leĝe permesatajn rimedojn.

FINANCAJ RIMEDOJ

Artikolo 5

- 5.1 Membrokotizoj.
- 5.2 Kontribuoj de donacantoj.
- 5.3 Rentoj kaj heredaĵoj.
- 5.4 Aliaj enspezoj.

MEMBRECO

Artikolo 6

- 6.1 Ĉiu persono kiu rekonas la statuton, sin okupas pri edukado kaj/aŭ instruado, povas membriĝi.
- 6.2 Membroj distingiĝas: "Sekciaj Membroj" (SM), "Individuaj Membroj" (IM) kaj "Honoraj Membroj" (HM).
- 6.3 Sekciaj Membroj estas are aliĝintaj al ILEI pere de la sekcioj.
- 6.4 Individuaj Membroj estas individue aliĝintaj al ILEI.
- 6.5 Honoraj Membroj estas nomitaj surbaze de siaj meritoj por ILEI aŭ por la instruado de Esperanto.

LA ORGANIZA STRUKTURO DE ILEI

Artikolo 7

- 7.1 La Asembleo.
- 7.2 La Komitato.
- 7.3 La Estraro.
- 7.4 La Sekcioj.

LA ASEMBLEO

- 7.1.1. konsistas el la estraro kaj delegitoj de la membroj kaj formas la superan organon.
- 7.1.2. pridiskutas la laboron faritan de la estraro kaj de la komitato, kaj la proponitan gvidlinion por venonta trijara periodo.

- 7.1.3. okazas minimume unu fojon dum tri jaroj en la kadro de konferenco de ILEI.
- 7.1.4. decidas pri akcepto aŭ ŝanĝo de la statuto.
- 7.1.5. elektas la estraron.
- 7.1.6. ĝiaj kunsidoj estas publikaj.

LA KOMITATO

- 7.2.1. konsistas el la sekcioj aŭ ties anstataŭantoj. Ili respondecas al siaj sekcioj.
- 7.2.2. pridiskutas la faritan laboron de la estraro, de la sekcioj kaj de la laborkomisionoj, kaj decidas la gvidlinion por la venonta jaro.
- 7.2.3. anstataŭas eksigintajn estraranojn inter du assembleoj.
- 7.2.4. povas senŝarĝi la estraron.
- 7.2.5. povas starigi kaj nuligi laborkomisionojn (L.K.).
- 7.2.6. kunsidas unu fojon en la jaro. La kunsidojn rajtas ĉeesti ĉiuj membroj kaj invititoj.
- 7.2.7. decidas en kazo de apelacio kontraŭ eksmembriĝo.
- 7.2.8. decidas per simpla plimulto da voĉoj.
- 7.2.9. fiksas la jaran membrotizon kaj aprobas la buĝeton kaj la bilancon.

LA ESTRARO

- 7.3.1. gvidas la Ligon.
- 7.3.2. faras proponojn pri agadlinioj kaj dezirataj aktivecoj al la Komitato.
- 7.3.3. raportas kaj respondecas pri siaj agoj al Asembleo kaj Komitato.
- 7.3.4. povas okazigi referendumon se urĝaj aferoj necesigas decidon de la Komitato.
- 7.3.5. konsistas el nepara nombro da membroj, minimume kvin: prezidanto, ĝenerala sekretario, estrarano pri financoj, vicprezidanto kaj vicsekretario.
- 7.3.6. ilia oficaŭro estas trijara. Eksigintaj estraranoj estas tuj reelekteblaj.

LA SEKCIOJ

- 7.4.1. agas en difinita geografia teritorio.
- 7.4.2. mem respondecas pri ĉiuj siaj agoj.
- 7.4.3. povas esti fondataj per minimume 5 membroj.
- 7.4.4. pri ilia akcepto decidas la Estraro.
- 7.4.5. pagas la kotizon ĉiujare antaŭ la unua de Februaro.
- 7.4.6. geografie proksimaj povas kunlabori.

TASKOJ DE LA PREZIDANTO

Artikolo 8

- 8.1 Kunvoki kaj prezidi la kunvenojn de la Estraro, de la Komitato kaj de la Asembleo.
- 8.2 Reprezenti ILEI en eksteraj rilatoj.
- 8.3 Starigi rilatojn kun aliaj instruistaj organizaĵoj.
- 8.4 Stimuli ĉiujn aktivecojn por atingi la celon de ILEI kaj la plenumon de la taskoj.
- 8.5 Havas la rajton sin anstataŭigi.

TASKOJ DE LA ĜENERALA SEKRETARIO

Artikolo 9

- 9.1 Respondeci pri la organiza stato de ILEI.
- 9.2 Kontakti kun la sekcioj kaj la individuaj membroj.
- 9.3 Organizi novajn sekciojn.
- 9.4 Kompili kaj prezenti la organizan jarraporton al la Komitato.

TASKOJ DE LA ESTRARANO PRI FINANCOJ

Artikolo 10

- 10.1 Zorge gardi la bonhavojn de ILEI.
- 10.2 Kolekti la kotizojn.
- 10.3 Kompili la finanĉan raporton de la jaro, prezenti ĝin al la Kontrola Komisiono kaj poste al la Komitato.
- 10.4 Kompili buĝeton por la venonta jaro kaj prezenti ĝin al la komitato.

TASKOJ DE LA VICPREZIDANTO

Artikolo 11

- 11.1 Aranĝi enketojn pri la stato de la instruado de Esperanto.
- 11.2 Prepari statistikojn pri lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata.
- 11.3 Inter la kunsidoj prizorgi la kontaktojn kun la membroj de la Komitato kaj de la Laborkomisionoj.
- 11.4 Asisti la prezidanton ĉe liaj taskoj kaj anstataŭi lin.

TASKOJ DE LA VICSEKRETARIO

Artikolo 12

- 12.1 Okupi sin pri la varbado de novaj membroj.
- 12.2 Zorgi pri informado kiel eble plej larĝskale.
- 12.3 Zorgi pri regula aperado de la ILEI-publikaĵoj.

12.4 Asisti la ĝeneralan sekretariojn ĉe liaj taskoj.

PUBLIKAĴOJ

Artikolo 13

- 13.1 La oficiala organo de ILEI nomiĝas: "Internacia Pedagogia Revuo" - IPR.
- 13.2 IPR estas rekta kunligilo kun la membroj inter la konferencoj.
- 13.3 IPR aperas tri foje en la jaro.
- 13.4 La redaktoro de IPR estas nomita de la Estraro.
- 13.5 Aliaj publikaĵoj, raportoj aŭ specialaj eldonoj de ILEI aperas kun la subtitolo: "Kajero de Internacia Pedagogia Revuo - IPR".

ĈESO DE LA MEMBRECO

Artikolo 14

- 14.1 Eksmembriĝo okazas aŭ per sciigo de la sekcio aŭ per sciigo de la membro.
- 14.2 La sciigoj devas okazi, minimume trimonatojn antaŭ la fino de la jaro, per registrita letero al la ĝenerala sekretario.
- 14.3 Eksmembriĝo okazas aŭ pro dujara nepagado de la kotizo aŭ pro kontraŭstatuta agado.
- 14.4 La Estraro decidas pri eksmembriĝo kaj sciigas pri tio per registrita letero al la sekcio aŭ membro.
- 14.5 Kontraŭ la decido de la Estraro eblas apelacii ĉe la prezidanto de la Komitato, maksimume unu monaton post ricevo de la sub 14.4 celita letero. La prezidanto pritraktos la leteron en la venonta kunsido de la Komitato. Ĝis la decido de la Komitato la membreco restas ne tuŝita.

REGULARO

Artikolo 15

- 15.1 Al tiu ĉi Statuto apartenas regularo.

R E G U L A R O

DIFINOJ

Artikolo 1

- 1.1 En tiu ĉi regularo estas uzataj la mallongigoj kiel en la Statuto.
- 1.2 Pri akcepto aŭ ŝanĝo de tiu ĉi regularo decidas la Asembleo laŭ la sama proceduro kiu validas por la Statuto.

PRI FINANCAJ RIMEDOJ

(Artikolo 5 de la Statuto)

Artikolo 2

- 2.1 La Kotizon IM pagas ĉiujare antaŭ la unua de Februaro al la estrarano pri financoj, kiu fiksas la sumon de kotizo por ĉiuj landoj en nacia valuto.
- 2.2 Familianoj pagas la duonon de la kotizo kaj ne ricevas IPR-on. La samon pagas la simpatiantoj.

PRI MEMBRECO

(Artikolo 6 de la Statuto)

Artikolo 3

- 3.1 Ĉiuj membroj havas la rajton ĉeesti la konferencojn de ILEI.
- 3.2 Ĉiuj membroj ricevas la oficialan organon IPR.
- 3.3 Surbaze da artikolo 6.5 de la Statuto, la Asembleo povas aparte distingi membrojn de ILEI per la titolo "Honora membro".
- 3.4 HM povas esti proponita de la komitato, de la Estraro, de Sekcio aŭ de minimume 5 membroj de la Asembleo.

PRI LABORKOMISIONOJ. (LK)

(Artikolo 7.2.4. de la Statuto)

Artikolo 4

- 4.1 LK konsistas el minimume 3 membroj el kiuj unu estu komitatano.
- 4.2 LK raportas al la Estraro laŭ interkonsentita formo.
- 4.3 LK havas difinitan taskon kaj tempodaŭron.

PRI VOĈDONO

(Artikolo 7.2.8. de la Statuto)

- 4.4 En kazo de egaleco de la voĉoj decidas la voĉdono de la prezidanto krom kio koncernas la estraron.

PRI LA ESTRARELEKTO

(Artikolo 7.2.3. de la Statuto)

Artikolo 5

- 5.1 La membroj de la Estraro estas unuope elektitaj aŭ reelektitaj por tri jaroj.
- 5.2 La elekto okazas per skriba aŭ parola voĉdono dum Asembleo.
- 5.3 La rajton proponi kandidatigon havas: la Estraro, la Komitatanoj kaj grupo de minimume 5 asembleanoj.
- 5.4 En kazo de intertempa eksiĝo de estrarano, la prezidanto respondecas pri daŭrigo de ties laboro.

PRI LA SEKCIOJ

(Artikolo 7.4 de la Statuto)

Artikolo 6

- 6.1 La sekcioj sciigu al la ĝenerala sekretario en kiu geografia teritorio ĝi agas. Ne necesas ke la teritorio egalas al ŝtato.
- 6.2 Sekcio elektas sekciestron, kiu gvidas kaj reprezentas ĝin. (SE)
- 6.3 Sekcio nomas konstantan reprezentanton ĉe la landa UNESKO-komisiono.
- 6.4 Sekcio sendu siajn publikaĵojn ankaŭ al la Estraro kaj redaktoro de IPR.
- 6.5 Ricevitaj raportoj, protokoloj kaj bultenoj fare de la Estraro estu senprokraste komunikitaj al la membroj.
- 6.6 La SE respondecas pri la akurata pago de la kotizo.
- 6.7 La SE prizorgu la jaran statistikon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj de la teritorio. La enketata dato estas la unua de Novembro. La statistiko estu sendata antaŭ la unua de Februaro al la koncerna estrarano.
- 6.8 La SE sendu ĝis la unua de Junio laborraporton pri la pasinta jaro al la ĝenerala sekretario.

PRI LA ASEMBLEO

(Artikolo 7.1 de la Statuto)

Artikolo 7

- 7.1 Por la konsisto de la Asembleo la sekcioj nomas delegitojn laŭ la ĉisuba tabelo:

ek de 5 membroj	unu delegito
de 6 ĝis 15 membroj	du delegitoj
de 16 ĝis 45 membroj	tri delegitoj
por ĉiu plia 15 aŭ parto de 15	unu plia delegito.
- 7.2 La bazo por fiksi la nombron de delegitoj estas la pagita kotizo por la antaŭa jaro.
- 7.3 Pri akcepto aŭ ŝanĝo de la Statuto aŭ de la Regularo kaj pri eventuala malfondo de ILEI, la Asembleo decidas per minimume du trionoj de la validaj voĉoj.
- 7.4 En kazo de malfondo la Asembleo nomas komisionon kiu: likvidas la kurantajn aferojn de ILEI; indikas la rimedojn por kovri eventualan deficiiton aŭ donacas la restantajn havaĵojn al alia organizaĵo, kiun indikas la decido pri malfondo.